# La Karavelo

**Beletra Esperanto-Revuo pri la Portugallingva Literaturo**

**n-ro 016**
**junio 2009**



*Fondita de João José Santos, en Portugalio, en oktobro 2007*




**Homa perlo: la araba lingvo ⇨ paĝo 6-8**



# La Karavelo n-ro 016
# junio 2009


| | | |
|---|---|---|
| 1 | Kovrilo: Homa perlo: La araba lingvo. | El la redaktejo |
| 2 | Enhavo – Kolofono | El la redaktejo |
| 3 | Ĉefartikolo: Esperanto plu estas uzata inter la spiritistoj. | João José Santos |
| 5 | Fernando Pessoa: Mesaĝo (35-a poemo) | João José Santos |
| 6 | Homa perlo: La araba lingvo. (eseo) | Wael Al-Mahdi |
| 9 | Iliado latina (2) (poezio) | Gerrit Berveling |
| 13 | Bukareŝto (poezio) | Luiza Carol |
| 13 | Tri poemoj pri majo (poezio) | Nikolaj Neĉaev |
| 14 | Pál Gyulai: En Leányfalu (poezio) | Tibor J. Szabadi |
| 15 | Sylla Chaves... (funebre) | Renato Corsetti, João José Santos |
| 17 | Machado de Assis: Bonan tagon! (kroniko) | Francisco Wechsler |
| 19 | Alfredo de Mesquita: La maizbulkoj (rakonto) | Eduardo Novembro |
| 22 | Universalaj Kongresoj de Esperanto (5-a – 1909) (historio) | Djalma Pessata |



La Karavelo 1-12 --- 45 €
du paperaj volumoj kun 12 revuoj
formato proksima de A4
kovrilo kolora, enhavo blankenigra
en bonkvalita papero


La Barko: La artikoloj enhavantaj la apudan bildon estas la plej facilaj por komencantoj. Uzu ilin por plibonigi vian lingvonivelon, aŭ tiun de viaj lernantoj. La vortoj de la artikoloj enbarkigitaj nur estos klarigitaj, se ili ne aperos en la Reta Vortaro: http://www.reta-vortaro.de/revo/

Responso: Pri ĉiu artikolo, ties gramatiko, enhavo, stilo kaj vortprovizo responsas la koncerna aŭtoro.

Al blindaj homoj: Kunlaboru bv. por plibonigi la legadon de *La Karavelo* far blindaj homoj.

Uzado de tekstoj el *La Karavelo:* Ne uzu tekstojn el la revuo *La Karavelo* aŭ el alia skribaĵo de *LK* en alia gazeto, sen antaŭa laŭcela permeso de la LK-direktisto. Havinte permeson por uzi tekston, ĉiam indiku la fonton. Ekz.: «El la revuo "La Karavelo", n-ro 9, junio 2008, paĝoj 5 ĝis 8». Nepre neniu havas la rajton iel modifi la tekstojn, aŭ resumi ilin. La permeso estas nur por revuoj, neniam por libroj aŭ por aliaj publikigaĵoj.

## Kolofono


**Konstantaj verkistoj...**
Djalma Pessata
Eduardo Novembro
Edward Jaśkiewicz
Francisco Wechsler
Geraldo Mattos
Gerrit Berveling
Imre Szabó
Irina Mironova
João José Santos
Leo De Cooman
Luiza Carol
Nikolaj Neĉaev
Paulo Sérgio Viana
Roberto Ribeiro
Tibor J. Szabadi
Valentin Melnikov

**Direktas, redaktas, kompostas**
João José Santos
**Reviziistoj**
Kurt Fischer
Luiza Carol - pri La Barko
Valentin Melnikov



**Telefono** (+351) 268 919 000
**PoŝTel.** (+351) 960 13 15 15
**Retadreso** **lakaravelo@gmail.com**
**Retejo** **www.esperantopt.com**

**Adreso**
*LA KARAVELO – Dr. João José Santos*
Fonte Velha, caixa 3003
7100-078 Estremoz – Portugal


**Recenzeblaj libroj**
estu sendotaj al la supra adreso.

**Reguloj**
Pri la principoj, labormaniero kaj reguloj de La Karavelo, nepre elŝutu kaj legu la dosieron Regularo de La Karavelo, el la ĉefa paĝo de nia retejo. Ĝi estas konstante aktualigata.

La Katalogo de La Karavelo
estas ĉiam aktualigita en
www.esperantopt.com

La Karavelo

© João José M. Q. dos Santos

*el la redaktejo...*





**João José Santos**

joaojosesantos@gmail.com

# Esperanto plu estas uzata inter la spiritistoj




Ĉefa paĝo de la forumo, en kiu oni informis, ke en majo 2009 la ĉefa diskuttemo estis esperanto.

## Esperanto en *Fórum Espírita*

Sekve de kelkaj kontaktoj, la forumestro de *Fórum Espírita* (portugalia *Spiritisma Forumo*), invitis min respondi al demandoj pri esperanto kaj ĝin debati dum la monato de majo, en kiu esperanto estis la ĉefa diskuttemo de tiu forumo:

http://www.forumespirita.net/

La debato estis tre varia. Tien mi sendis kelkajn tekstojn, videojn kaj muzikojn, klarigis pri la celoj de la esperantistoj, montris la avantaĝojn de esperanto por la spiritistoj kaj por la spiritisma movado, historiumis, debatis kaj argumentis... Kelkaj partoprenantoj memstare ne trovis intereson pri esperanto kaj tion ili asertis libere. Sed multaj interesiĝis pli kaj pli pri *la lingvo de la amikeco*, kiel mi ŝatas nomi nian lingvon. Kelkaj, kaj portugaloj kaj brazilanoj, volas aĉeti mian esperantan lernolibron por portugallingvanoj *Esperanto em 30 lições*, sed ĝi ankoraŭ ne estas preta. Baldaŭ. Pro konsilo mia kaj de aliaj homoj, kiuj jam konas la retejon *Lernu*, kelkaj el la partoprenantoj en tiuj debatoj eklernas esperanton en *Lernu*.

Iu ajn scipovanta la portugalan povas legi tiun debaton. Por interveni estas necese registriĝi en la retejo. Post tiu sukcesoplena provo, la forumestro daŭrigis tiun debatejon, kiu estiĝis konstanta, por portugallingvaj spiritistoj interesiĝantaj pri esperanto. Tio estas ja tre bona, ĉar tiel esperanto estos ĉiam je la dispono de tiuj, kiuj emas al ĝi. Ja, oni ne devigu iun ajn lerni esperanton, sed oni donu la eblecon al la interesatoj ĝin lerni. Krom tiu debatejo en la portugala, la forumestro proponis al mi gvidi debatojn en alia debatejo de la sama retejo. Ĉi tiu nova debatejo funkcios nur en esperanto, kaj la debatindaj temoj estas ekskluzive spiritismaj.

Ĉu esperanto stagnas? Jes, ĝi stagnas, kiam oni ne laboras por ĝi.

## Esperanto en la spiritisma movado

Brazilaj esperantistoj el San-Paŭlo asertas, ke daŭre esperanto estas instruata en multaj spiritismaj asocioj en la brazila subŝtato de San-Paŭlo. Same okazas en aliaj brazilaj subŝtatoj. Ne malofte okazas en Brazilo, ke neesperantisto lernas esperanton en la loka spiritisma asocio. La brazilaj spiritistaj esperantistoj laboras tiel multe por esperanto, ke eĉ estas necese klarigi al kelkaj neinformitaj homoj, ke esperanto estas lingvo ne nur de spiritistoj, sed de multaj aliaj homoj.

En Portugalio, la spiritistoj ankoraŭ ne alkutimiĝis akcepti kursojn kaj agadojn pri esperanto en siaj asocioj. Tamen, mi esperas, ke tiu kutimo iam enradikiĝos ankaŭ en Portugalio. Antaŭ 21 jaroj mi instruis esperanton en lisbona spiritisma asocio (*Centro Espírita Perdão e Caridade*), antaŭ 5 jaroj en transmonta spiritisma asocio (*Associação de Estudos Psíquico-Espirituais de Bragança*), kaj antaŭ 4 jaroj en alia lisbona spiritisma asocio (*Centro Espírita Casa do Caminho*). Mi ne konas aliajn kursojn efektiviĝintaj en portugaliaj spiritismaj asocioj.

La motivoj, kiuj gvidas la spiritistojn al esperanto, estas diversaj, sed en la unua loko estas la ideo pri frateca interkompreniĝo

kaj interrilato inter la homoj, la ideo pri tutmonda paco, finfine la ideo, kiu motivis Zamenhofon krei esperanton.

### La lingvoj de spiritismo

Spiritismo naskiĝis en 1857 en Francio, kiam Allan Kardec publikigis *La libron de la spiritoj*. Sekvis aliaj libroj de la sama aŭtoro kaj de aliaj, ankaŭ en la franca. Poste aperis aliaj verkoj en la rusa, angla, itala kaj en aliaj lingvoj. Rapide ĝi disvastiĝis tra aliajn landojn, kaj trovis la plej bonan kreskigan grundon en Brazilo. Do, la plej granda parto de la unuaj spiritismaj verkoj aperis en la franca, kaj la plej granda parto de la verkoj de la 20-a jarcento en la portugala. Kelkaj spiritismaj verkoj estas tradukitaj al multaj aliaj lingvoj.


### Uzo de esperanto kiel perlingvo por la disvastigo de spiritismo

Esperanto jam komencis ludi gravan rolon en la disvastigo de spiritismo, sed, tre bedaŭrinde, multaj spiritistoj ne konscias pri tio. Pro tiu motivo, la uzado de esperanto en la spiritisma medio ankoraŭ kuŝas nur en la tradukado de la spiritismaj libroj. La spiritismaj internaciaj kongresoj povus uzi esperanton kiel rilatlingvon, sed kelkaj decidpovaj spiritistoj ankoraŭ ne komprenis tion.

Unu el la plej belaj kaj plej konataj spiritismaj rakontoj nomiĝas *Nia Hejmo* (port.: *Nosso Lar*). Tiu verko estas tradukita al multaj lingvoj. La japana traduko efektiviĝis danke al esperanto, kiu funkcis kiel perlingvo, aŭ pontolingvo, en la traduka proceso.

Ne eblas ne mencii la elstaran traduk-laboron de la hungaro Tibor J. Szabadi, ankaŭ li kunlaboranto de La Karavelo ekde la unua horo. Li delonge tradukas la spiritismajn verkojn al la hungara, uzante esperanton kiel perlingvon. En ĉi tiu paĝo, aprezu la kovrilon de La libro de la spiritoj, tradukita de li en la hungaran, pere de esperanto. Szabadi ĝis nun tradukis el esperanto al la hungara la sekvajn spiritismajn verkojn, ĉiuj eldonitaj en Brazilo, escepte de la lasta:

*Memoraĵo de sinmortiginto;*
*Vivo feliĉa;*
*La semisto;*
*La libro de la spiritoj;*




Kovrilo de *La libro de la spiritoj*, de Allan Kardec, en la hungara, tradukita de Tibor J. Szabadi uzante esperanton kiel perlingvon.

*Historio de la spiritismo;*
*Kristana agendo;*
*La evangelio laŭ spiritismo;*
*Tio okazis inter la jaroj 2000 kaj 3000;*

kaj aliaj verkoj, kiuj ankoraŭ ne aperis libroforme.

Krom tio, li faris tradukojn, al la hungara, de aliaj verkoj kaj poemoj, kaj li skribis diversajn lingvikajn librojn. En ĉiuj verkoj, esperanto ĉiam iel ludis rolon. Li ankaŭ tradukis poemojn, verkojn ktp., el la hungara al Esperanto.

### Konkludo

Ĉiuj devas agnoski pro justeco, ke la spiritistoj ĉiam estis, ekde la unuaj tempoj de esperanto, laboremaj pioniroj en la disvastigo kaj instruado de esperanto, kompreninte, ke esperanto estas la plej taŭga komunikilo por la konstruo de pli bona mondo. Ω

**Rakontoj por ĉiuj aĝoj**

*Luiza Carol*

A5 – 167 paĝoj – 26 bildoj
16 eŭroj plus sendokostoj
mendu al: lakaravelo@gmail.com



## Mesaĝo - de Fernando Pesoo

***João José Santos***
***tradukis el la portugala***



**KVARA – LA FORTUNAJ INSULOJ**

Kiu voĉ' sonas en l' ondoj?
Ĝi ne estas la marvoĉo.
Estas ies voĉ' al ni,
sed silentas ĝi tuj kiam
ni atente ĝin aŭskultas.

Nur kiam ni duondormas,
senatente ni aŭskultas,
kaj ĝi nin diras l' esperon,
al kiu ni dormridetas,
kvazaŭ dormanta infano.

Jen la fortunaj insuloj.
Jen teroj de la mal-loko,
kie la Reĝo atendas.
Tamen, se ni ekvekiĝas,
l' voĉ' silentas, nuras l' maro.

Ω

**Rakontoj por ĉiuj aĝoj**
*Luiza Carol*
A5 – 167 paĝoj – 26 bildoj
16 eŭroj plus sendokostoj
mendu al: lakaravelo@gmail.com






**Wael Al-Mahdi**

naskiĝis en 1980 en la arab-golfa insulo, en la reĝlando de Barejno. Infanaĝe li loĝis en Usono kaj poste en Mezoriento. Lernis li Esperanton antaŭ pli ol 12 jaroj. Ŝajnas esti Wael la sola esperantisto en Barejno. Li diplomiĝis kiel dentisto kaj nun li laboras en sia hejmlando Barejno. Wael partoprenis en Universala Kongreso de 2003 en Gotenburgo, kaj ankaŭ en la unua esperantista Mezorienta Kunveno en Amano, Jordanio, en 2008. Li ŝatas lingvojn, historion, kulturon, sciencon kaj psikologion. Ω

# Homa perlo: La araba lingvo

***Wael Al-Mahdi***

*Mi estas la maro. En mia ventro kaŝiĝas perloj. Nu, ĉu vi demandis al la perl-ĉasisto pri miaj trezoroj?*

*Hafiz Ibrahim*

La araba estas vaste parolata lingvo. Pli ol 300 milionoj da homoj, en la araba mondo, parolas ĝin. Ĝi havas klasikan skribformon, ĉie unuforma, kaj sennombrajn regionajn dialektojn. En Unuiĝintaj Nacioj, en Internacia Islama Konferenco, kaj eĉ en Internacia Poŝta Asocio, ĝi estas oficiala lingvo. Ĝi estas la perlingvo de la islama sankta libro, la Korano, kaj jam de 1400 jaroj Islamanoj, mult-lingvaj kaj mult-kulturaj, lernas kaj uzas ĝin. Ĝia literaturo estas olda kaj vasta: poezio, prozo, scienco, historio. Male al multaj modernaj eŭropaj lingvoj, ĝi estas la sama lingvo laŭlonge de la tempo. Tio signifas, ke moderna arab-lingvano povas legi, kion skribis ties praulој de la 7-a jarcento, tra la mezepoko, ĝis nia tempo. Tio donas intelektan, emocian, kaj spiritan partoprenadon en la antikva mondo, kiu multe influis la nian.

La vasteco de la araba mondo sendube kontribuas al la grandeco de la lingvo, kiu donis al ĝi sian nomon. Dudek tri landoj, ekde Araba Golfo ĝis Atlantiko parolas ĝin. En tiu vastega ter-strio ĝi kovras multegon da kulturoj, historioj kaj geografioj. En unu ekstremo jen Barejno, malgranda insulo kuŝanta en la salaj akvoj de Golfo, kie la araba forprenis la mantelon de la akada lingvo, en tempoj antaŭ-memoraj. En la alia ekstremo, jen Maŭritanio, forprenita el la Berberoj kaj asimilita de la araba kulturo. En Sirio, Egipto kaj Mezopotamio, la araba daŭrigis antikvajn kulturojn, en multaj kazoj repreninta la rolon de parencaj semidaj lingvoj, kiel la aramea en Levanto kaj la kopta en Egipto.

Pro la nehaltigebla potenco, kiun donis Islamo al la araboj de la 7-a jarcento, ili eksplodis sur la internacian scenon, portantaj la Vorton de Dio kaj ŝanĝantaj kulturojn. En la proceso, multaj regionoj atestis lingvan transformiĝon. Egipto, Levanto, Libano, Nordafriko, kaj ĉiuj regionoj ekster Araba Duoninsulo, laŭgrade kaj senrevene, transformiĝis en arablingvajn landojn. En la Levanto, kun kiu la Araboj antaŭ-islame




engaĝiĝis en ampleksa komerco dum jarcentoj, la araba lingvo ne estis fremda. Ni rememoru, ke la araba estas parenca kun la aramea, semida lingvo, kaj kun ĝiaj idoj, t.e. la siriaka kaj la asiria, en Irako. La hebrea, sankta lingvo de la judoj, estas ano de ĉi tiu familio. Oni ne forgesu mencii aliajn gravajn anojn, kiel la akada, lingvo de treege antikva kulturo, kaj la fenica, la lingvo de tiuj geniuloj, kiuj inventis la alfabeton.

Sed la arablingva influo ne nur tuŝis la semidlingvajn regionojn. Ironie, kaj kun inverso de procesoj, la araba vaste influis la persan lingvon. Antaŭ-islame, la persa kulturo estis tre influpova, kaj je limigita mezuro influis la araban lingvon. Pri tio atestas vortoj kiel *ĥuda* (kasko), *askar* (el *laŝkar*, armeo), *haudaĝ* (kamel-seĝo), kaj eĉ, laŭ oni diras, *din* (religio; el la persa radiko *den_*: scio, saĝeco). Al tio oni povas aldoni kelkajn post-islamajn pruntaĵojn, grand-parte rilataj al novaj kulturaj kontribuoj kaj artikloj. Sed la persa mem, post la enkonduko de Islamo, verdire tute diluviĝis ricevante multegajn arabajn vortojn. Nuntempe spertuloj taksas, ke 50% el la moderna persa vortaro estas arabdevena. Kun la adopto de la araba alfabeto, la persa depruntis enorman nombron da arabaj vortoj, kovrantaj ĉiujn aspektojn de la esprim-kampo: religiajn kaj sciencajn terminojn, abstraktajn vortojn, grandegan nombron da verbo-substantivo paro, kaj eĉ ĉiutagajn vortojn. Al la lasta kategorio apartenas vortoj, kiel *vaqt* (tempo), *fekr* (penso), *ensân* (homo), kaj *fahmidan* (kompreni).

La persa, nun amika de la araba kaj agenta de ĝia influo, siavice vaste ŝanĝis la vortaran pejzaĝon de aliaj lingvoj: la turka, la urdua, la azerbajĝana, la uzbeka, la ujgura. Ĉi-lasta estas la lingvo de la islamana minoritato en la nordokcidento de Ĉinio, kaj la plej ekstrema azia limo de la islama mondo. Ĉiuj tiuj islamaj lingvoj ellevis grandan parton de siaj vortoj el la persa, nun nomitaj pers-arabaj vortoj. Tiel ili enkorpiĝis kaj fariĝis organa parto de la persa. Tiaj komunaj vortoj inkluzivas, en la turka, la vortojn *devlet*, *millet* kaj *vatan* (arabe *daulat*, *milla* kaj *watan*: ŝtato, nacio kaj patrujo respektive; ili estas parto de la turka nacia devizo). Konataj de la eŭropanoj estas la turka koncepto de *kismet* (*qismat:* sorto, destino, ordonitaj de Dio). En la urdua, oni trovas pers-arabajn vortojn, kiel *aql* (menso, racio), *qaum* (nacio), *zamir* (konscienco), *âdmi* (viro, homo, Adamido), kaj prepoziciojn kiel *baad* (post) kaj *taht* (sub); kaj eĉ la vorto *aurat "virino"*, kiu bedaŭrinde en la origina araba signifas "kaŝinda aĵo", kiel ekzemple la privataj kaj kaŝindaj organoj.


Ĵetante rigardon sur la vikipedian eldonon de la ujgura lingvo, oni vidas arab-persajn vortojn kiel *qeder* (kiomo), *hazir* (preta), *mezmun* (enhavaĵo) kaj *ziyaret* (vizito). Ni turniĝu al la araba literaturo. Fakte, la modernan formon de la araba, en gramatiko, prononco kaj vortaro, komencis kaj establis la Korano. Kiel la islandaj sagaoj, la Korano fiksis la antikvan lingvon kaj igis ĝin ankoraŭ komprenita al la islamanoj de la 21-a jarcento. El antaŭ-islamaj epokoj, oni ankoraŭ havas perlojn de la araba poezio, kiel la 7 Penditaj Odoj, fiksitaj de la paganaj araboj sur la Kaabo mem (sankta kub-konstruaĵo en la sankta urbo de Meko). Jen kiom ili adoras poezion kaj poetojn. Mezepoke, la araba iĝis perlingvo de vastega imperio. Sciencistoj, literaturistoj kaj religiuloj uzis ĝin por edifi siajn verkaĵojn. Multaj grekaj verkoj estis konservitaj en arabaj tradukoj. Ja araboj, arablingvaj persoj, berberoj, baratanoj kaj aliaj brakumis la antikvan saĝecon kaj aldonis plian saĝecon al ĝi. En Persio, iuj persoj fariĝas pli arablingvaj ol la araboj mem, kaj fakte ili igis la araban la sia lingvo, brakumante ĝin kiel la nunaj afrikanoj brakumas la koloniistajn lingvojn. Matematiko, fiziko, filologio, muziko kaj medicino floris per la araba. Arablingvaj aŭtoroj, multaj el ili pers-originaj, levis la araban al nova nivelo de esprimkapablo. Arablingvaj judoj ankaŭ kontribuis al tio, kiel la fama Andaluziano Majmonido. La kristanoj havis grandan rolon: en Libano, apartenis al ili la tasko modernigi kaj renovigi la araban, donantaj al ĝi pli freŝan stilon. La kristanoj de Libano kaj Sirio, krome, neniam hontas nomi Dion Allah, same kiel la islamanoj. En la moderna epoko, la araba daŭras vigla kiel literatura lingvo, kaj la mondo finfine agnoskis tion, per la atribuo de la nobelpremio al la egipta romanisto Nagib Mahfuz.

En la epoko de interreto kaj de rapida komunikado, kiel fartas la araba? La okcidenta mondo nur lastatempe konsciiĝas pri la graveco de la araba mondo, kaj nur laŭ negativa maniero. La doloregaj teror-atakoj de la 11-a de septembro katalizis la arablingvan instruadon en la Okcidento, kaj granda parto el tio pro celoj de "inteligenteco." Almenaŭ la bona aŭguro estas, ke la araba ne ŝrumpas. Ĝi ankaŭ ne multe kreskas, sed evidente ne ekzistas



minaco kontraŭ ĝi, kaj do ĝi ne perdas la kampon al aliaj pli fortaj lingvoj. Sed samtempe, io bezonas vigliĝi: la araba literaturo estas ne tiom sana kiel antaŭe. *Kien foriris la granduloj, kiel Taha Husejn kaj Gibran Kahli Gibran!?* - krias la puristoj. En post-moderna tempo, gustoj ŝanĝiĝas. Alt-kvalitaj literaturaj eldonaĵoj laŭgrade pereas, poezio stagnas, romanoj de aĉaj skribistoj estas truditaj sur la publikon, kaj la televizio reĝas. Ĉu oni esperu? Jes, se oni sekvas la vortojn eldiritaj, pri la araba, de alia grandulo, Hafiz Ibrahim: *Mi estas la maro. En mia ventro kaŝiĝas perloj. Nu, ĉu vi demandis al la perl-ĉasisto pri miaj trezoroj?* Ω





# *el* ***Iliado Latina***

***anonima***

***Gerrit Berveling***

***tradukis el la latina***



(2-a parto - sekvo el *La Karavelo n-ro 15*)

### Tetisa petas ke Jovo iel venĝu Aĥilon

Kaj kun harar' senorda, ŝi petas ĉe l' Reĝa genuo:
«Jen mi patrin' pro la filo alvenas ĉi tie petegi,
Patro de l' Dioj: venĝu vi min kaj mian karegan
Kontraŭ tiu Atrid'; ĉar alie – se *li* permesiĝos
Ke l' amatinon de mia Aĥil' li senpune misuzos –
Mortos hontinde la virt' venkita de l' fia libido.»
Jovo jenon respondis: «Formetu ĉi tristajn lamentojn,
Granda mara Diin', mi mem min ŝarĝos per tio.
Vi nun ekiru konsoli de l' filo la koron ĉagrenan.»
Diris li. Ŝi tra l' aero leĝera ĉiela reflugis
Al la konata strand', preferata ondar' de l' fratinoj.



### kverelo inter Junona kaj Jovo

Sed ofendiĝis Junona: «*Ĉu*, kara edzo», ŝi diris:
«Tiom valoras Tetis', – al Aĥilo ĉu *tiom* ŝuldiĝas,
Ke pereigi vi volas *miajn* amatajn Aĥivojn
Kaj revivigi la Trojajn fortojn? *Mi* ja nomiĝas
*Via* edzin' kaj mi portas la nomon de *kara* fratino!
Tio do 'stas via dono al mi? Ĉu do tiel vi amas?»
Tiavorte ŝi Tondrodion kolere akuzas
Kaj siavice liajn riproĉojn ŝi same suferas.
Fine, pro interven' de Vulkano, kverelo ĉi ĉesis
Kaj la Patro de l' Dioj dissolvis l' Olimpan kunsidon.
Intertempe subiĝis la Sun' post trakuro ĉiela
Kaj per riĉaj bankedoj la Dioj prizorgis la korpon;
Poste la liton ili ekserĉis kaj ties plezurojn.

### la Dormo ordonas al Agamemnono

Estis nokto, tutaĉiele brilis la steloj,
Kaj la homojn sonĝo katenis kaj same la Diojn,
Kiam potenca Dipatro la Dormon alvokis kaj voĉis:
«Ek do, descendu aere, ho vi plej senpeza de l' Dioj,
Kaj en rapida flugad' kampadejon Grekan aliru.
Dum ĝia estro dormas sub via peza agrablo,
Donu al li ĉi ordonojn: kiam morgaŭ matene
Jam leviĝis Titan'[1] kaj la tago forpelis la nokton,
Tuj li la siajn armigu, tuj malamikon ataku.»

[1] La Suno. (GB)

Sen hezit' fajnflugile la Dorm' tra l' aero forflugis
Al la dormejo de Agamemnono: ties korpo
Tie kuŝis malstreĉe, ripoze en dormo agrabla.
Lin alparolis jen la pelanto de zorgoj kaj laco:
«Reĝo Danaa, Atrido, vekiĝu! La Tondrodio
Min ordonas fluge alporti al vi ĉi ordonojn:
Aŭdu: kiam Titan' el la maro matene aperos,
Vi ordonu la viajn fortabrake sin armi
Kaj batalvice ekiri tuj al kampar' Iliona.»
Diris li. Tuj tra l' aero, tra kiu li venis, li reis.

**Agamemnono decidas ataki Trojon**

Intertempe la sun' al la tero la lumon redonis.
Tre mirigite de l' tasko, hero' Pelopsida kunvokis
Ĉiujn gravulojn kaj klare eksplikis l' aferon al ili:
Ĉiuj promesas la propran subtenon por la batalo
Kaj instigas la estron. La reĝo pervorte laŭdis
Ĉies kuraĝon samtempe dankante al ĉiuj egale.
Tiam Tersito (tiu plej hida persono ĉe Trojo,
Tiu plej fia en siaj esprimoj!) leviĝis kaj nepre
Negis, ke indas batali, kaj hejmen navigi konsilis
Retro patrujen: sed Odise' – konsilanto famega –
Vorte lin skurĝis kaj forte tradraŝis per sceptro ebura.
Ho, erupciis tiam kverelo: ĉiuj ekflamis,
Preskaŭ ili ekkaptis l' armilojn. Ĝisstele leviĝis
Krioj kaj ĉiujn kuntrenis blinda emo batali.
Fine, per sia saĝeco oldula, Nestoro sukcesis
Tutan l' amason rekvietigi per kalmaj konsiloj,
Kaj li revokis en ĉies memoron la antaŭdiron
El tiu tempo, en kiu Aŭlide aperis serpento,
Kiu sur arbo unue formanĝis ok etajn birdidojn
Kaj al ĉi morto de l' idoj aldonis ilian patrinon,
Kiu per korpo senpova klopodis por ilin defendi.
Diris l' oldulo: «Aĥivoj, mi foje refoje ripetas:
'stas nun la jaro deka, pri kiu parolis Kalĥaso:
Trojo falos ĉi-jare pro venkaj Grekaj armiloj!»
Ĉiuj hurais, laŭdis la saĝon de l' aĝa Nestoro
Kaj la kunveno subite disiĝis. Armojn prepari
L' estro ordonas, kaj mense kaj korpe sin batalpretigi.
Kiam la posta tago dispelis la ombrojn silentajn
Kaj la Titan' el la mar' aperigis la sunan kapon,
Tuj la fiera Atrido ordonis la siajn sin armi
Kaj batalvice ekiri, ek al kampar' Iliona.



**Rakontoj por ĉiuj aĝoj**

*Luiza Carol*

A5 – 167 paĝoj – 26 bildoj
16 eŭroj plus sendokostoj
mendu al: lakaravelo@gmail.com

**alvoko de la Muzoj**

Nun vi, ho Muzoj (ĉar kiom ne scias vi tute detale?),
Donu la nomojn de l' estroj kaj ties famaj prapatroj
Kaj la dolĉajn patrujojn: tio ja 'stas via tasko.
Diru ni, kiom da ŝipoj ĉiu Trojen venigis
Kaj l' entreprenon elfinu ni: ho Apolono estu
Nia patron' kaj li ĉiudetale volonte nin helpu.

**la t.n. ŝipokatalogo**[2]



Jen unue la princ' Peneleo, Lejto la forta,
Arkesilao la brula, Protoenor' kaj Klonio
El Beotio kondukis siajn kvindek ŝipojn
Kaj per forta remil' ili batis la ŝaŭmajn ondojn.
Poste jen Agamemnono, devena el urbo Mikeno,
Kiun por estro elektis la tuta Grekar' batalonta:
Li kunportis cent ŝipojn plenajn je bonaj soldatoj;
Kaj Menelao lin sekvis kun sesdek ŝipoj, brula
Pro batalemo; same feroca Agapenoro.
Lin apudis la fida Nestor' kun enkore lerteco
Kaj potenca konsil', kune kun la fila duop' li
Iris militi, ŝirmate de siaj sesdek ŝipoj.
Kaj Sĥedio la forta kaj potencul' Epistrofo,
Gloro de l' Mirmidonoj, du duraj militokverkoj,
Plugis la larĝajn akvojn per sia ŝipa kvardeko
Kaj Polipeto kaj Leonte' dufoje dudekon
Igis navigi plenajn je bone trejnitaj soldatoj.
Estroj kiel Stenel', Eŭrialo kaj batalforta
Tid'[3] tramuelis per forta remilo la marebenaĵon:
Ili ŝarĝis eĉ okdek ŝipojn per siaj soldatoj.
Askalaf' la potenca, Jalmeno – ambaŭ kuraĝaj –
Tridek ŝipegojn per remistoj muskolaj plenigis,
Kaj Ajaks', la plej forta el Lokro, duoble dudekon
Preta faris da ŝipoj; simile Eŭhemonido;
Ilin maldiste la Greka rempar' Aĥil' akompanis:
Kun kvindek' li navigis brave tra l' panjaj ondoj[4].
Iris tie Tesalaj junuloj Fidip' kaj Antifo
Kaj per trideko da kiloj boris la maran profundon,
Kaj kun ŝipa triop' la marglaton traboris Teŭkro
Kaj el Rodis' Tlepolemo kun naŭo; lin ege heroe
Sekvis Eŭmel', foririnta kun flot' je nur unu ŝipeto
Malpli granda ol havis Ajaks', Telamid' Salamisa[5].

---

[2] Kvankam por ni nunuloj eble sufiĉe seninteresa, tiu ĉi "ŝipo-katalogo" en la klasika epoko estis tre fama. Ekzistas en la Greka eĉ pluraj versioj; ĉar multaj Grekaj urboj provis pli poste iel enŝovi ankaŭ sian nomon en ĝin, por kvazaŭ pruvi sian praecon: se jam ĉe Homero oni estis konata … ĉu ne? (GB)

[3] Ritmokiale mi ŝanĝis Tideon en Tidon. (GB)

[4] La patrino de Aĥilo estas la mara Diino Tetisa. (GB)

[5] Ĉe Homero oni renkontas du Ajaksojn. La pli fama, Ajakso, filo de Telamono (aŭ Telamo) el Salamiso, fine de la Troja milito sinmortigis ĉar li sentis sin malhonorigita de Odiseo, kiam ne li – la granda heroo – sed la ruzulo Odiseo ricevis la armaĵojn de l' batalpereinta Aĥilo. La alia Ajakso estis filo de Oileo el Lokro. Ambaŭ kiel lokaj reĝoj kompreneble kunportis siajn proprajn soldatojn. (GB)



Kaj Magnezia Protoo, la fil' Tentredona, kaj kun li
Elefenoro, devena el vasta kamparo Eŭboja,
Kaj Duliĥia Megeso, armile kaj mense mirinda,
Kaj Toas', la Andremonido, el gento Etola:
Ĉiuj ĉi tiuj po kvardek ŝipoj albataligis.
Kaj la ruzul' el Itako[6] kunhavis dekduon da ŝipoj;
Sekvis post li kun sama kvant' Telamido Ajakso,
Tiu mirinda heroo; Guneo tuj poste ekvojis
Per siaj dudek du al la tiom kruela milito.
Idomeneo kaj (same el Kreta insul'!) Meriono
'stis provizitaj per du kvardekoj da batalŝipoj;
Kaj Menesteo, devena el fama gento Atena,
Same multajn navigis kiel kuraĝa Aĥilo.
Kaj Amfimaĥ' la fiera, Talpi' (Elide devenaj),
Kaj Poliksen', kuraĝulo famega, kaj krome Dioro,
Kune dufoje ŝarĝis soldate dudek ŝipojn.
Protesilao kaj forta Podarko alportis samtiom
Da ekipitaj ŝipoj, kiom Ajaks' Oilea;
Kaj Peantido venigis da ŝipoj armitaj sepopon;
Urĝe lin sekvis tuj Podalirjo kaj Maĥaono
Kiuj fendis la marajn ondojn per tridek ŝipegoj.
Sub ĉi gvidantoj soldatojn al Trojaj bordoj alportis
Mil cent Grekaj ŝipoj plus plia okdek' kaj sesopo[7]. Ω

www.esperantopt.com

[6] Odiseo. (GB)

[7] Tian tute nenaturan kalkulmanieron en poezio tiutempe oni tre ŝatis. (GB)



**Luiza Carol**

## Bukareŝto

Delonge ondoj de la vivo portis
min for de mia urbo Bukareŝt',
sed tien, en la branĉon de saliko,
revenas mia sonĝ' al sia nest'.
Ĉar mi unuafoje flaris floron
sub la ĉiel' de l' urbo Bukareŝt',
kaj ĉar mistero kaptis mian koron
unuafoje en tiea nest'.


Delonge ondoj de la vivo portis
min for de mia urbo Bukareŝt',
sed tien, sub tegmento de lernejo,
revenas mia pens' al sia nest'.
Ĉar mi unuafoje legis vorton
sub la ĉiel' de l' urbo Bukareŝt',
kaj ĉar mi aŭdis iam poemeton
unuafoje en tiea nest'.

Delonge ondoj de la vivo portis
min for de mia urbo Bukareŝt',
sed tien, ĉe la bordo de la lago,
revenas mia kant' al sia nest'.
Ĉar mi unuafoje ploris, ridis,
sub la ĉiel' de l' urbo Bukareŝt',
kaj mi demandis sen respond' demandon
unuafoje en tiea nest'. Ω



Luiza Carol fotita de amikino.
Parko de Bukareŝto (2002).

**Nikolaj Neĉaev**



## Maja sekundo

En ĉiu sekundo
Pro varmaj radioj
Naskiĝas abundo
Da junaj folioj.

En ĉiu sekundo
Pli blankas paduso,
Pli ĉeas hirundo,
Pli ĉeas apuso.

En ĉiu sekundo
Pro multo da floroj
Pli altas inundo
De ĝojo en koroj. Ω

## Maja foliaro

Per verda, viva, fajna faj'
Skeleton arban volvas maj'. Ω

## Maja poplo

Sub alto blua,
Sub nuba herd'
Por vivo plua
Aperas verd'.

Sub alto blua
Ekverdas nun
Folio glua,
Printempa jun'. Ω

**Rakontoj por ĉiuj aĝoj**

*Luiza Carol*


A5 – 167 paĝoj – 26 bildoj
16 eŭroj plus sendokostoj
mendu al: lakaravelo@gmail.com





***Tibor J. Szabadi***

***tradukis el la hungara***




# *En Leányfalu* [1]

***Pál Gyulai***

Multe mi ĵetadis, trudmoviĝis…
Sur la blua *Szamos*-bordo[2] mi naskiĝis.
Retiriĝas, ho kioma memoraĵo,
El arbar-monta pejzaĝo!

Ankaŭ *Maros*[3] min bone konis
Ĉe ĝi iam mia kanto sonis!
Patrujamo kaj amoro
Kunfandiĝis triste en anim' mia.

Loĝis mi ĉe l' bordo de *Spee*[4] kaj *Szajna*[5],
Kie pri patrujo nur famon aŭdanta
El feliĉo de popolo ĉi tia
Forte mi sentis ĝin vundita.

Estu salutata montpinto, burgruino,
Kaj vi, Danubo ĉe hungar' landlimo.
Nur rekte min plu kunportu…
Juna *Buda-Pest*[6] estu salut'!

Ektrovis pram-lokon mi fine,
Mi bonajn, malbon-jarojn pasigis ĉi tie:
Aro da zorg' sen kvieto
Pli da dolor', kaj ĝojero.

Ondmuĝado de Danubo logas,
Lacan animon mian vokas:
Plu, en flor' insulo verda,
Vilaĝeto, bosk' monteta.

Akceptu min valo, juglandombroj,
Gardu min kun birdflugil-ŝirmoj!
Bona ripozloko, eĉ por tombo,
Estu do, se estas devo.

Lulu min melankolia riverondo,
Birdo kantu sur prajuglando,
Floranta montet' min kovru,
Dum zefiro milde blovu! Ω



Leányfalu - Sorg vilao

---

1 Hungara titolo: Leányfalván, 1881. Leányfalván estas urbeto en Hungario (proksime de Budapest). (TJSz)
2 Rivero de Hungario kaj Rumanio. (TJSz)
3 Rivero de Hungario kaj Rumanio. (TJSz)
4 Rivero en Germanio. (TJSz)
5 Rivero en Francio (france: *Seine*). (TJSz)
6 Ĉefurbo de Hungario (trafluas ĝin la rivero Danubo). (TJSz)



**Renato Corsetti**

# Sylla Chaves

## unu el la plej grandaj esperantistoj de la unua jarcento de Esperanto

Estas ĉiam malfacile komenci artikolon pri mortinto. Aparte malfacila tio estas por mi, ĉar ĝis antaŭ kelkaj semajnoj mi estis korespondanta kun Sylla Chaves pri lia nova vortaro. La sola vera maniero por honori lin estas daŭrigi lian agadon.

Sylla Magalhães Chaves naskiĝis en 1929 en la urbo *Santana do Livramento* en la brazila subŝtato *Rio Grande do Sul*. Liaj gepatroj estis ambaŭ poem-verkistoj kaj multlingvuloj, kio montras kiom gravas la familia fono por la posta evoluo. Kiam li estis ankoraŭ infano, en 1937, la tuta familio transloĝiĝis al Rio-de-Ĵanejro.

Laŭ tio, kion li mem rakontis, li ekkonis Esperanton, kiam li estis sep-jara pere de libro de la onklino, per kiu li ankaŭ memlernis ĝin. De tiam li decidis, ke kiam li estos pli granda, li lernos pli bone Esperanton, kaj en 1946 – li estis tiam 17-jara – li vizitis la sidejon de Brazila Esperanto-Ligo, kiu tiam estis en Rio-de-Ĵanejro. Tiun tutan jaron li lernegis Esperanton kaj pri Esperanto, kaj fine li estis aprobita en ekzameno de la rigora instruisto Porto Carreiro Neto, kaj ricevis la diplomon de *profesoro aprobita*.

En la komenco de la 50-aj jaroj, Sylla Chaves unue studis juron en universitato en sia urbo. Poste li daŭrigis siajn studojn eksterlande: Komunikado en la Universitato de Stanfordo, en Usono, Politikaj Sciencoj en la Universitato de Parizo, en Francujo, kaj Kibernetika Pedagogio en la Universitato de Paderborno, en Germanujo. Li poste laboris en la sekretariejo de Unuiĝintaj Nacioj en Nov-Jorko kaj poste en Unesko en Parizo. Reveninte al Brazilo, li instruis dum pli ol 40 jaroj Socian Komunikadon kaj similajn fakojn en la Supera Lernejo de Publika Administrado, starigita de la Fondaĵo *Getúlio Vargas*.



Sylla Chaves (stare) kun Túlio Flores (side), en la 2-a Konferenco de Brazila Esperanto-Ligo (februaro 2009).
(foto ĝentile cedita al LK far Francisco Wechsler)

Ĉefe pro siaj verkoj, li estis konata kaj respektata en la Esperanto-mondo. Samtempe li estis ankaŭ vera aktivulo, kaj dum la tuta vivo tre ligata al Brazila Ligo de Esperanto, kies prezidanto li estis en la jaroj de 1978 ĝis 1982. Li ankaŭ membris en la Akademio Internacia de la Sciencoj de Sanmarino, kaj en Akademio de Esperanto de 1986 ĝis 1992. Post tiam li restis korespondanto de la Akademio de Esperanto. La unuaj listoj de radikoj, kiuj post longa kribrado iĝis la 9-a Oficiala Aldono, venis de li. En la jaro 1992 li estis ankaŭ elektita honora membro de UEA.

Generacioj de lernantoj lernis per liaj sennombraj libroj kaj instruaj diskoj. Li estis pioniro pri la uzo de modernaj instruaj helpiloj (bendoj, diskoj, koloraj bildoj, ktp.). Inter liaj plej konataj verkoj estas la disko *Brazilo kantas por pli bona mondo* (1970), *Brazila Esperanta Parnaso* (2007), *Oportuna Poŝvortaro* (2008) kaj la kurso *Aŭdu kaj Lernu*, kies radia versio estis dissendata de la Radio *Rio de Janeiro*.

Li estis homo kun simplaj gustoj kaj kun forta personeco. La forto de lia personeco iĝis evidenta, kiam li defendis siajn starpunktojn tre elokvente. Li estis, laŭ la homoj, kiuj multe rilatis kun li, malavara ĝis elstaraj ekzemploj de vera materia kaj morala helpego.

Ankaŭ tion konsideris la homoj, kiuj decidis aljuĝi al li la premion *Onisaburo Deguchi* dum la Universala Kongreso en Bergeno, Norvegujo, en la jaro 1991, pro la agado favora al la monda interkompreniĝo kaj paco.

En la lasta periodo de sia vivo, li estis laboranta por nova vortaro kune kun multaj kunlaborantoj, unu el kiuj estis mi.

Mi lasas al homoj pli kapablaj juĝi lian verkistan talenton, ĉefe lian tradukadon de multegaj brazilaj poemoj kaj kantoj. Mi mem povas juĝi nur lian vortaristan agadon, kaj tiu estas elstara. Mi ĵuĝas ĝin tia, ĉar mi konsentas pri la principoj, kiujn li sekvis. En recenzo pri lia *Oportuna Poŝvortaro* mi skribis (ĉi tie mi iom mallongigas kaj redaktas, ĉar la celo estas montri la principojn de Sylla):

Mi konsentas pri tio, ke en ĉiuj vortaroj por esperantistoj devas esti ĉiuj vortoj el la Fundamento kaj ĉiuj vortoj oficialigitaj de la Akademio.

Mi konsentas, ke en nia lingvo de ĉiam estis plurformaj vortoj (sinonimoj) kaj plursignifaj vortoj (homonimoj). Tiucele rigardu tion, kion Sylla faris en sia vortaro pri la vorto *Atlaso/atlaso*. Vi trovos: *atlaso 1.* (= karto, landkartaro); *atlaso 2.* (= sateno), *Atlaso 3.* (= Atlanto).

Mi konsentas pri tio, ke eĉ inter la oficialigitaj vortoj troviĝas tiuj, kiuj bezonas pli simplan esprimadon. Vidu ĉe *rimorso*, kie vi trovos la proponatan *pent-sufero*.

Sylla estas unu el la malmultaj esperantistoj, kiuj legis ankaŭ la duan parton de la regulo 15-a, kiu diras, ke oni prenu nur unu radikon kaj poste traktu ĝin laŭ la reguloj de Esperanto. Sylla tute kohere proponas: *redaktoro* (= redaktisto) kaj korektas la faron de la Akademio, kiu oficialigis en momento de ebrio la vorton *tragika* (= tragedia).

Mi konsentas, ke Esperanto estas kunmeta lingvo. Tio estas ĝia forto. Pri tio Sylla diras, ke prefere al *hipodromo* oni diru *ĉevalkurejo.*

Mi konsentas, ke por normala parolanto la subtilaj distingoj de botanikistoj kaj ĥemiistoj estas tute neinteresaj. Mi volas manĝi pomojn kaj ne volas scii pri la malsamecoj inter la ruĝaj pomoj kaj la blankaj pomoj, kiuj havas aliajn nomojn por la botanikisto.

Sed preter la unuopaj punktoj, mi konsentas ĝenerale pri la strebo de Sylla teni Esperanton simpla kaj por normalaj homoj.

Tia vortaristo kaj homo estis Sylla, pro kio lia forpaso plenigis ne nur min je bedaŭro. Mia dua instruisto post Claude Piron lasis nin. Liaj verkoj kaj lia viv-ekzemplo tamen restas. Ω

## *Interkrucaj vojoj*

***João José Santos***

Antaŭ ĉirkaŭ 20 jaroj, mi instruis esperanton en Portugala Esperanto-Asocio (PEA) ĉiusabate posttagmeze dum pluraj horoj. La libro elektita de mi, inter diversaj eblecoj, estis *Nova amiko inter ni*, kaj ĝia aŭtoro estis Sylla Chaves.

Ne la unuan fojon mi ion legis de tiu aŭtoro. Malmultajn jarojn antaŭe, la tiama prezidantino de Portugala Spiritisma Federacio (PSF), Maria Raquel Duarte Santos, komprenante mian entuziasmon por esperanto (tiam mi estis estrarano de PSF), donacis al mi libron nomiĝantan *Por pli bona mondo*. Ĝia aŭtoro estis iu Sylla Chaves, pri kiu mi neniam antaŭe aŭdis. Raquel diris al mi, ke la patrino de Sylla, ankaŭ ŝi spiritisto, donacis al ŝi tiun libron, kaj ke, laŭ Raquel, tiu libro estus en pli bonaj manoj, se ĝi kuŝus en miaj manoj, laŭ la entuziasmo, kiun mi tiam montris por esperanto. Raquel estis tiam ne plu juna sinjorino, kaj mi estis eble 26-jaraĝa.

Ne multajn jarojn poste, Sylla Chaves vizitis la sidejon de PEA, en Lisbono, kaj mi kunmanĝis kun li kaj kun kelkaj portugalaj esperantistoj. Mi memoras, kiom respekto-plene mi atente aŭskultis lian vervon, sentante tian energian personecon.

Pasis multaj jaroj, en kiuj Sylla kaj mi ne vojkruciĝis. Antaŭ unu jaro kaj duono, mi invitis lin kunlabori en La Karavelo. Li dankis min, gratulis min, sed rifuzis mian proponon, asertante, ke lia tuta restanta vivotempo estos dediĉita al la vortaro kiun li prilaboris. Malgraŭ tio, mi kaj li ankoraŭ interŝanĝis pasiajn mesaĝojn, en kiuj, ambaŭ ni impete, energie sed ĉiam respektoplene starigis niajn vidpunktojn pri esperanta lingviko. Post unu jaro aperis la *Oportuna Poŝvortaro*. Post ĉirkaŭ alia jaro, Sylla finis ĉi tiun sian surteran vivon. Intertempe, antaŭ kelkaj monatoj, li publikigis la poezian antologion *Brazila Esperanto-Parnaso*, kies recenzo aperis en La Karavelo n-ro 9, paĝoj 16-17.

Jen kelkaj vortoj pri iom tikla afero. Sylla ne estis spiritisto, kvankam ŝia patrino estis spiritisto. Tamen, tio ne signifas, ke li ne kredis pri Dio kaj pri reenkarniĝo. Mi jam trovis en kelkaj brazilanoj realan spiritisman pens-manieron, kvankam ili mem ne konsideras, ke ili estas spiritistoj.

Iel ajn, kara Sylla, la vero sendependas de niaj kredoj. Ĝis iam, sed certe ĝis tiam. Ω



***Francisco Stefano Wechsler***

***tradukis el la portugala verkis la enkondukon***

## ENKONDUKO

La sekva kroniko publikiĝis la 26-an de junio 1888, en la ĵurnalo *A Gazeta de Notícias*, kaj ĝi apartenas al la serio ordinare nomata *Bonan tagon!*, pro la komencaj du vortoj. Machado de Assis verkis la kronikojn de 1888 ĝis 1889, dum la lasta jaro kaj duono de la imperia reĝimo. Kontraŭ sia kutimo, li verkis nek propranome nek kaŝnome, sed sennome. Fakte la ĝenerala publiko ekkonis la veran aŭtoron nur en 1955. Ĉi-rimede li akiris pli da libero por pli akre kritiki la politikan situacion.

Pro premo de la angla registaro, brazila leĝo malpermesis enportadon de sklavoj ekde 1831, tamen sklavtrafikistoj ĝin ignoris. La angla premado plu daŭris kaj, de 1849 ĝis 1851, anglaj militŝipoj arestis proksimume 90 sklavoŝipojn vojaĝantajn al Brazilo. En 1850, la Brazila Parlamento aprobis alian leĝon pli severan, kaj fine ĉesis la enportado. Publikaj sklavaŭkcioj estis malpermesitaj en 1868, kaj ankaŭ vendapartigo de patrinoj disde iliaj gefiloj. Ekde 1871, la gefiloj de sklavinoj naskiĝis liberaj, kvankam ili devis servi siajn sinjorojn ĝis ili fariĝos dudek-unu-jaraj. Ekde 1885, gesklavoj atingintaj sian sesdek-kvinan jaron aŭtomate liberiĝis. Dum 1887 kaj en la komenco de 1888, amasfuĝoj de sklavoj akute plioftiĝis. Sklaveco estis fine estingita la 13-an de majo 1888.

La teksto de la leĝo de 1888 estas tre konciza kaj tute ne mencias kompenspagon por sklavposedintoj. Sed dek unu tagojn post ĝia sankcio, oni prezentis ĉe la Ĉambro de Deputitoj leĝprojekton pri kompenspago. Inter julio kaj decembro 1888, sepdek naŭ tiajn projektojn oni sensukcese prezentis ĉe la Parlamento.

Dum la Provizora Respublika Regado (1889-1891), oni fondis bankon sole nur por ricevi kompenspagojn. Ĝiaj posedantoj pledis rekte al Rui Barbosa, la tiama financministro, kiu respondis skribe: "Pli juste estus, kaj pli konforme al la tutnacia sento, se oni povus elpensi manieron kompenspagi al la antaŭaj sklavoj, ne ŝarĝante la Ŝtatan Trezorejon. Rifuzite. La 11-an de novembro 1890". La premado tamen daŭris, kaj Rui Barbosa serĉis alian solvon. Pretekstante la neceson forviŝi nigran makulon de la brazila historio, li ordonis, je la 14-a de decembro 1890, la bruligon de ĉiuj oficialaj libroj kaj dokumentoj pri sklaveco troveblaj ĉe la financministrejo. Tiun ĉi decidon oni komencis plenumi nur je la 13-a de majo 1891, sub la administrado de Tristão Alencar Araripe, la sekva financministro. La ago, kvankam politike pravigebla manovro, senigis Brazilon je valoregaj dokumentoj pri ĝia pasinteco.

Finrezulte, kompenspagon ricevis nek posedintoj nek liberigitoj. Post la estingo de sklaveco, multaj senlaboraj liberigitoj forlasis bienojn kaj migris al urboj, ŝveligante domaĉarojn. Ω



Lei N. 3353 de 13 de Maio de 1888

Declara extincta a escravidão no Brasil

A Princeza Imperial Regente em Nome de Sua Magestade o Imperador o Senhor D. Pedro II, Faz saber a todos os subditos do Imperio que a Assemblea Geral Decretou e Ella sancionou a Lei seguinte:

Artigo 1º. É declarada extincta desde a data d'esta Lei a escravidão no Brasil.

Artigo 2º. Revogam-se as disposições em contrario.

Manda portanto a todas as autoridades a quem o conhecimento e execução da referida Lei pertencer, que a cumpram e façam cumprir e guardar tão inteiramente como n'ella se contem.

O Secretario de Estado dos Negocios d'Agricultura, Commercio e Obras Publicas e Interino dos Negocios Estrangeiros, Bacharel Rodrigo Augusto da Silva, do Conselho de Sua Magestade o Imperador, o faça imprimir, publicar e correr.

Dado no Palacio do Rio de Janeiro, em 13 de Maio de 1888 – 67º da Independencia e do Imperio.

Princeza Imperial Regente

Rodrigo A. da Silva

Carta de Lei, pela qual Vossa Alteza Imperial Manda executar o Decreto da Assemblea Geral, que Houve por bem sancionar, declarando extincta a escravidão no Brasil, como n'ella se declara.

Para Vossa Alteza Imperial ver.

# *Bonan tagon!*

(kroniko)

***Machado de Assis***
(1839-1908)

Se mi havus krediton en la merkato, mi pruntus de negockunulo kelkdudek milionojn da rejsoj, kaj aĉetus liberigitojn. Aĉeti liberigitojn ne estas klara esprimo, tial mi daŭrigas.

Ĉu vi leganto konas libron verkitan de la fama Gogol, rusa romanisto, titolitan *Malvivaj Animoj*? Ni supozu, ke vi ne konas, por ke mi povu pritrakti la ĝermon de mia ideo. Jen ĝi en malmultaj vortoj.

Oni nomas *animoj* la kamparanojn, kiuj kulturas la terojn de servutulposedanto, kaj laŭ kies nombro li pagas imposton al la ŝtato. Ĝis la imposto registriĝos, mortos kelkaj kamparanoj kaj naskiĝos aliaj. Kiam okazas deficito, kiun kaŭzis la devo de la posedanto pagi laŭ la kvanto registrita antaŭ la proksima homnombrado, tiam oni nomas *malvivaj animoj* la mankantajn kamparanojn.

Ĉiĉikov, ruzegulo je mia nivelo, aŭ eĉ supera, elpensis aĉeti la *malvivajn animojn* de pluraj posedantoj. Bona negoco por la posedantoj, kiuj vendadis mortintojn aŭ simplajn nomojn por kelkaj groŝaĉoj. Ĉiĉikov, akirinte kelkmil malvivajn animojn, tuj prenis

la posedatestojn kaj iris al ia ŝtata lombardejo kiu, je la elmontro de la leĝaj dokumentoj, antaŭpagis al la supozata posedanto ĉirkaŭ 200.000 rublojn; Ĉiĉikov envalizigis ilin kaj fuĝis al loko, kie la rusa polico ne povos lin trafi.

Mi pensas, ke vi ĉiuj ekkomprenis; vidu nun mian planon, tiel rafinitan kiel tiu kaj multe pli honestan. Vi scias, ke honesto similas indienon; ekzistas ĉiapreza, ekde groŝoduono.

Supozu, leganto, ke vi posedis ducent sklavojn je la 12-a de majo kaj vi perdis ilin pro la leĝo de la 13-a. Mi venus al via komercejo kaj demandus:

— Ĉu viaj liberigitoj ĉiuj restis?

— Nur duono, restis cent. La aliaj cent disiris; laŭdire ili vagas en Santo Antônio de Pádua[1].

— Ĉu vi volas ilin vendi al mi?

Surpriziĝo via, leganto; kaj mi klarigas:

— Vendi ĉiujn al mi, kaj la restantojn kaj la fuĝintojn.

Miregas vi, leganto:

— Sed, sinjoro, kian intereson povus vi havi...

— Ne zorgu pri tio. Ĉu vi vendos?

— Liberigitojn oni ne vendas.

— Prave, sed la vendatesto montros la daton de la 29-a de aprilo; tial ne vi perdis la sklavojn, sed mi. La prezoj listitaj en la dokumento laŭos la tabelon de la leĝo de 1885[2]; sed mi vere ne pagos pli ol po dek mil rejsoj.

Vi leganto kalkulas:

— Ducent kapoj je po dek mil rejsoj sumas du milionojn. Du milionoj por uloj, kiuj neniom valoras, ĉar jam liberaj, estas bona negoco.

Poste, pensinte:

— Sed, pardonon, ĉu vi kunprenos ilin?

— Ne, sinjoro: ili plu laboros por vi; mi kunprenos nur la vendateston.

— Kian salajron vi petas por ili?

— Nenian, ĉar miaflanke ili laboros senpage. Vi pagos al ili, kiom vi jam pagas.

Evidente, leganto, pro via nekompreno vi akceptus la negocon. Mi irus al aliulo, poste al aliulo, poste al aliulo, ĝis mi akirus kvincent liberigitojn, ĉar tiom atingus la pruntitaj kvin milionoj; mi enhejmiĝus kaj restus atendante.

Atendante kion? Atendante la kompens-pagon, diable! Kvincent liberigitoj je po tricent mil rejsoj, meznombre, sumus cent kvindek milionojn; garantiita profito: cent kvardek kvin.

Pri tiu ĉi afero de kompenspago, kelkaj diras, ke ĝi eble funkcius, aliaj, ke eble ne: jen kial mi pruntus de negockunulo. Se ĝi funkcius, mi pagus kaj edze kuniĝus (al vi legantino, ekzemple); se ne, mi restus fraŭlo kaj perdus nenion, ĉar la mono apartenus al aliulo. Agnosku vi ĉiuj, ke ĝi estus bona negoco.

Mi eĉ suspektas, ke jam iuj faras ĝuste tion, escepte ke ili kunprenas la liberigitojn. Vi ĉiuj scias, ke, dum la tempo de sklaveco, sklavoj estis reklamataj per multaj honoraj kvalifikoj: perfektaj kuiristoj, bonegaj kelneroj ktp; ĉe alia bieno, okazis la samo, kion ordinare faras vendistoj: superaj kalikotoj, belegaj indienoj, ravaj kretonoj. Se kretonoj, indienoj kaj sklavoj sin reklamus, ili ne kapablus malkaŝi siajn meritojn.

Nu, hieraŭ mi legis anoncon, per kiu oni luofertas sur strato, kies nomon mi ne memoras, — mi pensas, ke sur la strato Senhor dos Passos[3], — unu *eminentan* amelistinon. Se temas pri manko de modesto, jen unu el la bedaŭrindaj fruktoj de libero; sed se temas pri ulo, kiu jam anticipis min...

Lasu min, fia Ĉiĉikov! Aŭ male ni negocu egalparte. Ω

Bonan nokton.

ASSIS, Machado de, "Bons Dias!",
Campinas SP, Editora da UNICAMP, 2008.
Introdução e notas: John Gledson. 3a. ed.

**Rakontoj por ĉiuj aĝoj**

*Luiza Carol*

A5 – 167 paĝoj – 26 bildoj
16 eŭroj plus sendokostoj
mendu al: lakaravelo@gmail.com



1 Municipo en la norda parto de la ŝtato Rio, kie ĵus liberigitaj sklavoj vagadis senlabore. (FW)

2 Sklavoj malpli ol 30 jaraĝaj: 900 mil rejsoj; inter 30 kaj 40 jaroj: 800 mil rejsoj; inter 40 kaj 50 jaroj: 600 mil rejsoj; inter 50 kaj 55 jaroj: 400 mil rejsoj; inter 55 kaj 60 jaroj: 200 mil rejsoj. (FW)

3 Strato en la centro de Rio. (FW)

# La Maizbulkoj



***Alfredo de Mesquita***
(1871-1931)

***Eduardo Novembro***
tradukis el la portugala

Estis eble pli-malpli la dek-unua kaj duono vespere, kiam Alkantaro rehejmiĝis tute malsekigita, ambaŭmane alĝustigante al la kolo la surtutan kolumon. De la bulĉapela randeto forfluis akvo kiel el pluvdefluilo, gutante poste sur la nazpinton, kaj de tie ĝi disiĝis en sinua kaskado tra la lipharoj. Preterpasante la Placon Anunciadon — kie laboroj embarasis trairadon — por devojiĝi de veturilo li preskaŭ ĝisgenue enŝoviĝis en kaveton. Suprenirinte la doman ŝtuparon kaj alveninte al sia etaĝo, nur kiam li enmetis la ŝlosilon en la seruron li ekmemoris la maizbulkojn, kiujn lia edzino tiom insiste estis komisiinta al li.

— Ha! La maizbulkoj!

Reenpoŝigante la ŝlosilon, li piedpinte repaŝis la ŝtuparon, ĉi-foje malsupren. Tiu estis la unua Kristnaska Vespero, kiun ili estis travivantaj kune post sia geedziĝo okazinta naŭ monatojn pli frue. Antaŭ ol eliri al kromlaboro, kiel kutime, li demandis ŝin:

— Manjo, kion vi volas, ke mi kunportu hodiaŭ?

— Ho, alportu maizbulkojn...

— Ĉu el la flavetaj?

— Jes, el la flavetaj! Sed multajn, ĉu vi aŭdas? Alportu multajn!

— Ĉu dek du?

— Eĉ pli! Alportu dek ok...

Bone por li, kies salajro estis ja malforta, la edzinaj deziroj neniel estis elspezigaj. Escepte de unu fojo, kiam ŝi petis asparagojn, kaj tiaokaze en Lisbono unu sola lado estis trovebla ĉe ununura vendejo, kie oni postulis de li dek ok groŝojn — la ceteraj petoj estis simplaĵoj facile haveblaj kaj malmulte kostaj. Iel ajn li ne hezitus eĉ ŝuldiĝi ĝisorele aŭ ĝisokule por alporti ion ajn deziratan de ŝi.

— Ha, la maizbulkoj!



Li retroiris sen malagrablo. La konfitejo ĉe Strato de Nigrulinoj certe estis ankoraŭ malfermita, kaj tute proksima. Tamen, kiam tuj atingonte la lokon, li aŭdis la feran ondoforman pordon malvolviĝi kaj frape fermiĝi surgrunden. Du komizoj de la tiea sukeraĵejo estis ĵus foririntaj, ĉiu siaflanken.

Sian paŝadon li akcelis laŭlonge de la Avenuo, nun esperante atingi la vendejon de Strato de Princo; bedaŭrinde ankaŭ tiu jam ne estis malfermata. Tiam, ekafliktiĝante kaj konsterniĝante, li preterpasis la teatron Don Mario, trairis Rosion — ne rememorante pri la konfitejo najbare de Apoteko Azevedo —, kaj sin ĵetis en Straton Bestegon.

Danke al Dio! Tiu estis ankoraŭ malfermita kaj plenplena de maizbulkoj, flavetaj kaj aliaj. Ĝojege, anstataŭ dek ok, li aĉetis dudek du, kaj tuj rehejmiĝis jam ne atentante pri la pluvo. Kioman pluvon Dio donadis!

Oni povus eĉ diri, ke ju pli li sentis la malsekigitan veston algluiĝi al la korpo, la akvon forfluantan de la bulĉapela randeto sur la nazon, kaj la piedojn enmarĉigitajn ene de la botoj, despli li antaŭĝuis la plezuron alveni hejmen, sin bone sekigi, ŝanĝi vestaĵojn, surmeti la pantoflojn kaj sidiĝi ĉe la tablo kune kun sia tre kara Manjo vidalvide, kaj kun la tradicia telerplenego da moruo fumiĝanta inter terpomoj, laŭmode de Alenteĝo, en tiu festa nokto.

Pli rapide ol la diablo frotas okulon daŭris la reiro de Alkantaro al sia domo ĉe la supro de Strato de Fido. Pro la hasto, ŝajnis ke lin pelis raketo.

Denove li enmetis la ŝlosilon en la seruron, denove li turnis ĝin, kaj ĉifoje enpaŝis. Apenaŭ enirinte, surprizita de la

reganta malhelo, li aŭdis Manjon forte ĝemanta. Eĉ tra la senlumo, tre afliktite li alkuris al la dormoĉambro de kie la ĝemadoj elaŭdiĝis.

— Manjo! Manjo!...

Sed Manjo ne respondis, nur ĝemis, ĝemadis… Korŝokon li sentis.

Manjo ĝemis senĉese, ĝemadis pli kaj pli forte; tiom forte, ke la ĝemoj jam iĝis krioj. Kaj laste ŝi tiom kriis, ke la kompatinda edzo, trafita de surprizo inter la neesprimebla patreca ĝojsento neniam antaŭe spertita, kaj la timo sin trovi tute sola ĉe la antaŭa elprovo, ne plu sciis, kion fari, kaj ankaŭ li same ĝemis, preskaŭ same kriis.

Pro la krioj alkuris la apuda najbarino, sinjorino Inacio, ĉar ankaŭ ŝi restis tutsola ĉe si. Ŝia edzo, dungita kiel reĝisoro en la teatro de Strato de Grafoj, rehejmiĝus nur post noktomezo; tamen, ŝi pretigis sin resti kune kun Manjo dum sinjoro Alkantaro forirus por alvoki akuŝistinon — ĉar tuj alvenonta jen la grava horo.

Sinjorino Inacio iĝis providenca! Kaj Alkantaro, ne ŝanĝinte la vestaĵon, eĉ ne la botojn, forkuris laŭlonge de la ŝtuparo malsupren.

Apud la Hospitalo Sankta Marto loĝis du akuŝistinoj, unu ĉi-malsupre, la alia tie pli supre. Sed Manjo insiste diradis, ke ŝi volus esti flegata de iu fama Ermelindo Ŝalupo loĝanta proksime al Placo de Figarbo, ĉar oni opiniis ke ŝi estis ege kompetenta pri la metio akuŝi.

Proksimume al Placo de Figarbo, jes ja, tute bone, sed ekzakte kie? Ĉirkaŭ tiu placo, ĉirkaŭe, estis ankoraŭ ne malpli ol kvar longaj stratoj, malantaŭ kiuj nenombreblaj pliaj! En kiu el ili estus la domo de la lerta sinjorino Ermelindo Ŝalupo?

Je tia horo, en nokto de familiaj festoj, pro kio ĉiuj klopodis rehejmiĝi kiel eble plej frue, kaj super ĉio kaŭze de la furioziĝinta tempesto, eĉ ne unu persono estis trovebla surstrate. Nun eĉ ne estis espero trafi malfermitan vendejon.

La sola savrimedo, nur la nokta gardisto.

Streĉante la pluvombrelon subbrake, li ĉirkaŭiris tiun placon manfrapante tiel forte, kvazaŭ oni estus invitinta lin por aplaŭdi teatraĵon antaŭe suferinta piedfrapadon.

Tamen, noktogardisto estas homo kiu, kiom ajn oni alvoku lin, kutime li aperas nur je monatfino kun kvitanco ĉemane! La horloĝo de Karmo ĵus sonigis la unuan horon, do la tago jam estis la dudek-kvina, kaj nek Alkantaro, nek Manjo, ĉefe ŝi mem, povis atendi ĝis la fino de la monato…

Nu, ĉi tiu mondo plenplenas de okazaĵoj komprenigeblaj nur per miraklo de sanktulo aŭ artifikoj de l' diablo. Ĵus sin turninte ĉe stratangulo rekte al Placo Poso Boratemo, levante la okulojn ĉielen serĉe de savrimedo, ĝuste fronte al lia vizaĝo jen anonctabulo:

***ERMELINDO ŜALUPO – Akuŝistino***

Nur tiam, tiel trovinte subite tion, kion li pene serĉadis, kaj nur kiam li ne plu bezonis iun ajn por demandi pri la bezonata informo, li ekvidis du nigrajn figurojn starantajn apud stratlampo je distanco ne malproksima, kaj ankoraŭ du pliajn ie pli fore, duonkaŝe glisantajn laŭlonge de muro direkte al la kvartalo Magdaleno.

La anonctabulo sidis sub fenestrobreto ĉe la dua etaĝo de malnova domo, kies pordo — tion li malkovris tuj — estis apenaŭ malfermita. Li puŝis ĝin, eniris kaj volis ekflamigi alumeton; tamen liaj alumetoj ne ekbruliĝis, kiom ajn li strekus ilin sur la skatolo, ĉar ili estis humidigitaj de la pluvakvo trapenetrinta ĝis liajn poŝojn.

Singardema, tuŝesplorante la murojn kaj ŝtuparon, li supreniradis la unuan deklivon, kun la mano etendita blindpalpe, kiu, nenion trovinte, restis fingrumanta en la vakuo. Du paŝojn li antaŭeniris, ankoraŭ du pliajn, sed muron li trafis. Li sin trovis en koridoro, kaj daŭrigis. Supozante, ke li devus pluen marŝi tute rekten, li puŝiĝis kontraŭ ŝtupo. Certe alia deklivo, kiun li supreniris fidema. Je la tria ŝtupo, tamen, lia kruro jam firme leviĝante alten, ne povis apogi sin tiel tuje kiel antaŭkalkulite, kaj surplanken li piedfrapegis.

— Malbenita ŝtuparo! — li sakris.

Ne plu sciante kien sin direkti, li iris maldekstren…

— Diable! Alia koridoro…

Sed subite, bum! Jen ekfrapiĝo kontraŭ trabaron, kvazaŭ fritonta ovo sur padofundon.

— Hu! Tio troegis…

Tiam, jam perdinte la nocion pri la supreniritaj ŝtupardeklivoj, la trairitaj koridoroj, la muroj pripalpitaj, inter afliktiĝoj kaj stumbladoj, kolereta kaj konfuza, amiko Alkantaro pugnobatis la obstaklon, jen kiel repago, jen ĉar ŝajnis al li, ke tiu estus ja la pordo de sinjorino Ermelindo Ŝalupo.

Klinko glitas, la pordo apenaŭ malfermiĝas, el interne videblas lumo kaj malantaŭ la bartrabo, kiel timigonta besto, enkaĝigita, vasta korpo kun malbriligitaj okulvitroj, plus ĝisokula barbo, demandas bleke:

— Kiu frapas?

— Ĉu vi bonvolus… — Alkantaro beis samtone, kiel respondis la ŝafido al la lupo en la fablo kie ambaŭ kune trinkadis el la sama purakva rojo.

Tiam la vastkorpulo — kun malbriligitaj okulvitroj plus ĝisokula barbo — malfermis la trabaron kaj iom retropaŝis, ŝajne permesonte, sen pliaj demandoj, la eniron de la hezitema alveninto. Tiu ĉi, fingropinte tuŝis la ĉapelan randeton ekenironte, sed neatendite du tranĉe penetrantaj krifoj eniĝis en liajn nudkarnajn ŝultrojn, kaj iu senforma, bestaĉa, apokalipse peza kaj fortega bloko impetis renversante lin surplanken, kun la ventro malsupre, tiel barante la enirejon; sekvis senorda surtretado sur lin per teruregaj naĝilhirtaj monstroj traokule ĵetantaj furiozon, kun hufobatoj, ululantaj raŭksonoj, ruliĝadoj kaj saltoj, kune kun aerturniĝado de nodlhavaj retorditaj bastonegoj, kvazaŭ kolosaj tentakloj, serĉe de homripoj…

De ĉe la fundo de la koridoro, renkonte al la alsaltantaro, ekatakis senbride grupo de individuoj, kelkaj en ĉemizmanikoj, aliaj nudkapaj, la ceteraj kun mentonbarbo kaj lip- aŭ vangharoj; pliaj, jen dandaj, jen ĉifon-vestitaj; ankoraŭ aliaj disĵetis seĝodetruojn, tablajn fragmentojn, rubo-ŝovelilojn kaj balailojn. Iuj, ne sukcesinte forsaviĝi tra la kaŝanguloj, nek tra la fenestroj, iĝis kaptitaj de la monstroj — kiuj ilin ĉasadis — kaj kurbaraktis kvazaŭ katoj gluteje stringitaj ĉe ties manoj. Subtablajn fuĝintojn oni prenis per la pantalon-postaĵoj, kaj forĵetis surstraten. Rezistantojn oni ĉifis kiel malnovajn kapvestojn. Subite la tuta misordo enfalis en mallumon; iu ulo estis turninta la kranon de la gasa kalkulmetro; nur tiam aŭdiĝis multaj fajfglobetoj kaj moneretoj ruliĝantaj en la tenebro.

*   *   *

Kiam Alkantaro elsveniĝis, kun la kraniohaŭto ŝirita per breĉo, jam la suno alte briladis super la tero — belega decembra suno, kiu haste lekis la stratŝtonojn kaj tegmento-randojn. Oni estis kunportinta lin subbrake al la policejo, kaj tie ĵetita sur matracon ĉe karcera angulo.

Kio estis okazinta? El kia afliktiga premsonĝo li vekiĝis kaj iĝis liberigita? Ĉu ja li mem, Alkantaro, estis envolviĝinta en tiu malkvieta kaj komplika sonĝo? Ĉu fakte estis li, kiu havis la kapon fenditan kaj ankoraŭ gutigantan lian amatan sangon? Ĉu tiu kapo estis nekontesteble la lia?

Kio estis okazinta? Kiel tio okazis?

Kiom ajn protestante kaj asertante, ke li neniam estis enirinta en trompludan domon, kaj ke dum sia tuta vivo li eĉ ne unu fojon vetintis, klarigante, ke la tre kompromita cirkonstanco esti trafita ĉe l' freŝa faro (kiel oni estis ŝarĝinta lin en la polica raporto), per la simpla beligita priskribo de la vero — nek en la policejo aŭ en la tribunalo, nek en sia oficejo, kie la kolegoj pretigis admiregan bonvenon, neniu, absolute neniu, volis kredi je la historio, kiun la povra Alkantaro rakontadis kaj pri kiu li senkulpigis sin.

— Kiel amuza tio estas!

— Granda ŝercemulo!

— Kia spritulo vi fariĝis!...

Pro sia dutaga forestado for de la oficejo tuj post Kristnasko, li petis de sia estro senkulpigon, ĉar la edzino estis tiam akuŝinta, kaj kun servilema rideto de patra kontenteco, aldonis ke "Via Ekscelenco" de nun disponos pri unu plia servanteto je ordono lia. Sed la estro, ankaŭ la estro, ne sen ia tono de bonkoreco, kaj nur por ke Alkantaro lin treege danku, opiniis:

— Nun, jam havanta idon, klopodu korekti vian konduton! Atentu, ke nenio pli malbona ekzistas ol tia manio al hazardludado! Ω

**Rakontoj por ĉiuj aĝoj**

*Luiza Carol*

A5 – 167 paĝoj – 26 bildoj
16 eŭroj plus sendokostoj
mendu al: lakaravelo@gmail.com





*Djalma Pessata*

# UNIVERSALAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO

## 1909

## 5-a Universala Kongreso de Esperanto




**Loko:** Barcelono, Hispanio

**Dato:** 6-a ĝis 11-a de Septembro

**Aliĝintoj:** 1500

La 5-a Universala kongreso de Esperanto okazis sub la nomo 5-a Tutmonda Kongreso de Esperanto. La fama kataluna esperantisto **Frederic Pujula i Valles** estis la prezidanto de la kongreso. Rimarkinde, **Reĝo Alfonso XIII de Hispanio** ĉeestis kaj montris sian subtenon al la lingvo. Tie la reĝo renkontis D-ron Zamenhof-n kaj donis al li la titolon de **"Komandanto de la Ordeno de Izabel La Katolika"** kaj post tio la registaro oficiale permesis, ke oni instruu Esperanton en la oficialaj lernejoj, unue en Universitato de Madrido.



Frederic Pujula i Valles



Emblemo de Ordeno de Izabel



Reĝo Alfonso XIII

La 5-a kongreso ankaŭ havis iom da politika sento, ĉar partoprenis pluraj anarkistaj (ekzemple Ferrer i Guàrdia), komunistaj kaj respublikaj esperantistoj. Nelonge antaŭe, lokaj maldekstristaj esperantistoj inkluziviĝis en 'La Tragika Semajno', sanga ribelo en Barcelono sufokita de la armeo, kun pli ol cent mortintoj, dekoj da bruligitaj preĝejoj kaj miloj da arestitoj.

Ankaŭ dum tiu kongreso aperis la ideo pri **IKUE** (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista). En Barcelono la katolikoj okazigis diversajn kunvenojn, kaj tie oni decidis okazigi la unuan Kongreson de Katolikaj Esperantistoj en Parizo, en 1910, kiam IKUE estis fondita.

## LA EKZAMENOJ DE 1909

Dum la 5-a UK de 1909, **Internacia Instituto de Esperanto**, ĵus kreita en 1908, por internacia servado de instruado kaj organizo de normalaj lernejoj kaj diplomoj, aranĝis la jenajn ekzamenojn:

► pri Gramatiko, sub kontrolo de Cart, Corret kaj Marie Hankel;

► pri Literaturo, sub kontrolo de Ostrovski, S. Meyer, Kühnl;

► pri Historio kaj Organizo, sub kontrolo de Hodler kaj Rosseau;

► pri Instruaj Metodoj, sub kontrolo de Mann, Blaise kaj Privat.

## LA FLORAJ LUDOJ

En 1909, dum la 5a Barcelona UK, la kataluna esperantistaro internaciigis la tradiciajn "Floraj Ludoj", la literaturaj konkursoj de tiu epoko. La internaciaj "Floraj Ludoj" fontas el mezepoka okcitana tradicio. Jam en 1393, tiu beletra festo estis enportita en Katalunion kaj dum la 19-a jarcento ĝin oni reprenis kiel simbolon de retroviĝo kun la klasikeco de la kataluna lingvo. En la 5-a UK, **Marie Hankel** gajnis la unuan premion pro sia poemo "La Simbolo de l' Amo"

### LA SIMBOLO DE L' AMO

**Marie Hankel**

Rozujo sovaĝa, simbolo de l' amo,
En vintro vi staras sen ia ornamo!
En kampo vi nuda ĉagrenas dezerte,
Rozujo, malvarmo mortigos vin certe.

Mallaŭte tre dolĉa voĉeto elsonas:
"Silentu, silentu, mi dormon bezonas,
Min nutras denove patrino la tero.
Trankvile atendas mi ĝis la somero."

Dormantan rozujon printempo vekigis,
Somero ĝin riĉe kaj bele florigis.
Ho, donu al mi nun kroneton belfloran,
Girlandan, balancan kaj brile koloran!

"Ne tuŝu, ne ŝiru floraron, la mian.
Mi pikos, mi vundos la manon, la vian,
Pro amo mi miajn floretojn defendos,
Pro amo mi miajn pikilojn forsendos."


Al vento ĝi florofoliojn oferis,
Aŭtune la fruktoj fiere aperis:
Rozujo, simbolo de l' amo vi estas,
Trankvila, alloga, kuraĝa vi estas.



Marie Hankel

## TEATRAĴO PREZENTITA

Inter la teatraĵoj prezentitaj en la 5-a UK, meritas rimarkon **Mistero de Doloro**, de Adria Gual, kun profesiaj geaktoroj. Frederic Pujula i Valles, tiam direktoro de la Teatro Romea, tradukis kaj reĝisoris la teatraĵon.



Solena Malfermo de la 5-a UK (1909)



Kongresanaro en Barcelono (1909)

## ĈU VI JAM SCIIS, KE...

► … en la 5-a UK okazis **bicikla konkuro** kaj D-ro Zamenhof prezentis al la gajninto **La Pokalon Esperanton?**

► … la voĉo de la majstro Zamenhof estis registrata sur bendo dum la 5-a UK?



► ... la akcepto de Barcelono kiel urbo por la UK en 1909 vekis grandan entuziasmon inter la kataluna esperantistaro? Preskaŭ 50 kursoj okazis en la komenco de 1909 nur en Barcelono. En la resto de la lando, novaj grupoj kaj novaj gazetoj (tamen kun tre efemera ekzisto) aperis en ĉiu loko. "Kataluna Nacio", katalunisma gazeto; "Supren!", ankaŭ katalunisma gazeto; "Tutmonda Sonorilo", ilustrita; "Jen", humura; kaj diversaj grupaj bultenoj estas eldonitaj dum tiu jaro. La UK okazis kun granda sukceso, malgraŭ la malbona politika situacio, kiu ekregis en Barcelono unu monaton antaŭ la UK. (el *Enciklopedio de Esperanto*) Ω

**Rakontoj por ĉiuj aĝoj**

*Luiza Carol*

A5 – 167 paĝoj – 26 bildoj
16 eŭroj plus sendokostoj
mendu al: lakaravelo@gmail.com